



ENHAVO

	Paĝo
K. Vâlev. Al konstanta plibonigo de nia asocia organo (ĉefartikolo) .	1
I. S. Turgenev. Miaj arboj	2
G. Simeonov. Esperanto—senco de unu vivo	3
J. Kalinov. Nekutima edziĝtesto en Ŝtrâklevo	4
S. M. Simeonov. Metamorfozo	5
J. I. Atanasov. Petko Patarinski	6
I. Draganov. La malfacila tasko	7
I. Filev, B. K., St. Panajotova. Organiza vivo	9
T. K. Kelkaj pensoj pri nia E-agado	10
* * * Tra Sovetunio	10
* * * Esperanto en GDR	11
Internacia konferenco en Sonenberg	12
M. Tambian. Kiel fariĝi malsana	14
L. Paspaleeva. Pri la museto, kiu estis pli saĝa ol la homoj, pli forta ol la koko kaj pli kuraĝa ol la kato	15
Leda Mileva. Al panjo	16
Venelin Mitev. Kolombo kaj Pavo	17

Kovrilpaĝo: Esperanto eniris ankaŭ en Ardino: la unuaj E-kursoj — por lernantoj kaj instruistoj, — gvidataj de Nikolaj Bojaĝiev

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**AL KONSTANTA PLIBONIGO DE NIA ASOCIA ORGANO!**

„Bulgara Esperantisto“ — la organo de Bulgara Esperantista Asocio, estas unu el la plej gravaj helpantoj de ĝia CK por unuigo de la bulgaraj esperantistoj en ĵortan kaj aŭtoritatan organizaĵon, kapablan respondi inde al la novaj, ĉiam pli multaj kaj pli grandaj bezonoj de la E-movado — enlanda kaj eksterlanda. Ĝi kontribuas por klerigo kaj edukado de la bulgaraj esperantistoj en spirito de socialisma patriotismo kaj internaciismo, de kunlaboro kaj estimo al ĉiuj popoloj, de paco kaj amikeco en la mondo. Samtempe „Bulgara Esperantisto“ kontribuas por plialtigo de la lingva nivelo de nia esperantistaro. La rolo de la asocia organo kiel aktiva organizanto, edukanto kaj instruanto estas senduba kaj de ĉiuj rekonata. Tio devigas la CK kaj ĝian Estraron, la Redaktan Komitaton kaj la bulgarajn esperantistojn fari ĉion eblan por ĝia konstanta plibonigo kaj sukceso.

Ĉi tie ni ne povus tuŝi ĉiujn demandojn, sed almenaŭ du — kun ekskluzive grava signifo por la sukceso de nia organo — ni devas tuŝi. Des pli ke ilia bona solvo dependas de neniu ekstera faktoro, sed nur de ni mem.

Unue: ni deziras atentigi, ke riĉaj, variaj kaj bonkvalitaj materialoj ne povas aperi sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ sen la helpo de vasta reto de kunlaborantoj. Speciale la rubrikoj „Organiza Vivo“ kaj „Juna Esperantisto“, kies destino estas respeguli la E-vivon kaj agadon en la tuta lando, fakte ne povus ekzisti sen regula kunlaborado. Tial ĉiu estraro de E-societo, sekcio aŭ distrikta komitato devas tuj fiksi unu, du aŭ — se estas necese — pli da konstantaj korespondantoj de „Bulgara Esperantisto“ el tiuj, kluĵ havas la necesan komunan kaj lingvan kulturon, senton de respondeco kaj disciplino kaj — tre grave — literaturan kapablon, emon al verkado. Nek unu pli grava E-manifestiĝo kaj iniciato devas resti nerespegulita en nia E-gazetaro. Speciale grava estas nemalfruigi la raportojn, sendi ilin tuj post la okazintaĵoj kaj, dezirinde, akompanatajn de fotoj. La Redakcio aranĝos specialan kartotekon de siaj korespondantoj.

Kiuj posedas literaturan talenton, devas regule liveri originalajn aŭ tradukitajn verkojn — rakontojn, versaĵojn, fabletojn, humoraĵojn k. s. Oni tamen traduku verkojn de bonaj aŭtoroj, konformajn al la karaktero de nia organo.

Due: necesas variigi la enhavon de la gazeto laŭ temaro. Tiurilate nin grave limigas ĝia malgranda amplekso. Io tamen estas farenda. Sendube,

ni daŭrigos la ĝisnunajn rubrikojn pri lingvaj kaj metodikaj demandoj, pri esperantistoj, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo, pri E-novaĵoj el la tuta mondo, pri novaj libroj k. a. Por la unuaj du ni akre bazonas materialojn de lingvistoj kaj pedagogoj. En ligo kun la 25-a datreveno de nia socialisma revolucio ni aperigos biografiajn skizojn pri mortjalintaj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj kun konvenaj fotoj.

Samtempe ni provos aperi ekzemple jenajn novajn rubrikojn: „Veteranoj rakontas“ — rememoroj pri forpasintaj jaroj de nia E-movado; „Pri Esperanto“ — intervjuoj kaj eldiroj pri Esperanto fare de eminentaj homoj — ŝtatestroj, socipolitikaj kaj kulturaj agantoj, scienculoj-verkistoj, artistoj k. a.; „Nia avangardo“ — skizoj pri laboravangarduloj-esperantistoj el ĉiuj sferoj de la materia produktado kaj pri aktivuloj en la E-agado; „Ĉarma lando“ — skizoj pri vidindaj lokoj en nia lando, interesaj ankaŭ por eksterlandaj turistoj kaj gastoj; „Por la malgrandaj esperantistoj“ — rakontoj, versaĵoj, fabloj, vortludoj k. s.; „Demandoj kaj respondoj“ — kun tute diversakaraktero: historio, organiza vivo, problemoj de Esperanto kaj E-movado — nia kaj eksterlanda; „Distra paĝo“ — kun humoraĵoj, ŝercoj, krucvortaj enigmoj k. s.; „Koncize“ — pri Esperanto-eventoj; „Nia poŝto“ k. t. p.

Kompreneble, aperos ankaŭ aliaj materialoj, ekster la konstantaj rubrikoj — ekzemple pri interesaj faktoj el la vivo, naturo, scienco, tekniko k. a.

Gravan signifon ne nur por ilustro de iuj apartaj materialoj, sed ankaŭ por variigo kaj plibeligo de la tuteca aspekto de la gazeto havas la fotoj. Bedaŭrinde oni sendas tro nesufiĉe da fotoj. Tiurilate ni ankaŭ petas kunlaboron. Kompreneble, la fotoj bezonas kelkan tempon por prilaborado, tial oni povas sendi ilin iom post la materialo mem. Sed fotoj bonkvalitaj.

Estas tute klare, ke realigo de ĉiuj ĉi taskoj bezonas la fortojn de multaj homoj.

Al konscia, regula kunlaboro — ĉiu laŭ siaj ebloj kaj emoj!

Okaze de la 150-a datreveno de la
naskiĝo de Ivan S. Turgenev

MIAJ ARBOJ de I. S. Turgenev

Mi ricevis leteron de iama amiko el la Universitato — riĉa bienposedanto, aristokrato. Li invitis min al sia bieno.

Mi sciis, ke li delonge estas malsana, blinda, paralizita, apenaŭ iranta. . . Kaj mi forveturis.

Mi lin trovis en unu el la aleoj de lia vasta parko. Volvita en pelt, malgraŭ ke estis somero, velkinta, ŝrumpinta, kun verda ombrelo super la okuloj, li sidis en malgranda veturileto, kiun puŝis de malantaŭe du lakeoj en riĉaj livreo. . .

— Bonan venon — li flustris kun tomba voĉo — en mian heredaĵon, en la

ombron de miaj centjaraj kverkoj.

Super lia kapo kiel tendo etendis siajn branĉojn potenca miljara kverko.

Mi pensis: „Ho, miljara giganto, ĉu vi aŭdas? Unu duonmorta vermo, rampanta ĉe viaj radikoj, nomas vin sia arbo!“

Sed jen ekblovis venteto kaj mallaŭte eksusuris en la densa foliaro de la giganto. . . Al mi ŝajnis, ke la maljuna kverko respondas per bonanima, mallaŭta rido kaj al mia penso, kaj al la fanfaronado de la malsanulo. . .

Tradukis R. Konstantinova



Ni, kvarope societanoj, kolektiĝis ĝustatempe antaŭ la fervoja stacidomo. La kaŭzo — letero de nekonata junulo-esperantisto el v. Dimovo, distrikto de Vidin. La E-estraro opiniis, ke ĝi bone konas la esperantistojn en la distrikto. Sed evidentigis, ke la lingvo Esperanto enpenetras la popolon sen nia rekomendo kaj permeso. . .

Eksciinte, ke en Vidin estas E-societo, la nekonata junulo skribis leteron al nia prezidanto, k-do Ignat Nikolov, kaj invitis lin gastigi por interkonatiĝo, ĉar li. . . de sia naskiĝo ne povas marŝi. . .

La lasta penso tre mirigis nin. Kian volon devas posedi tiu ĉi homo lernante la lingvon sen perspektivo viziti E-kongresojn, veturi gaste al eksterlandaj esperantistoj? . . . Nia intereso estis granda.

La lokomotivo ekfajfis kaj la vagonaro nesentebles ekmoviĝis sur la paralelaj ferlinioj. Ĝi forportis nin tien, en v. Dimovo, kie tremis unu honesta esperantista koro, unu animo sincera kaj sindona al la E-movado.

Ni alveturis. La grupeto da esperantistoj elvagoniĝis. Kun verda flageto en mano ni ekmarŝis sur la ĉefa strato de la vilaĝo. Agrablan impreson faris al ni la belaj duetaĝaj domoj, novaj kaj koketaj. Preskaŭ antaŭ ĉiu domo estis florgardeno kun vitoj.

Jen la domo, kiun ni serĉis. K-do Radul Petrov, avertita per letere, atendis nin en sia ĉambro.

Ni frapis sur la pordo. Mi eniris la unua.

— Ĉu vi estas Radul Petrov? — mi demandis esperantlingve.

— Jes, mi estas. Bonan venon, kamaradoj! Mi tre ĝojas havi tiajn gastojn!

Ni ekmiris, aŭdinte klaran kaj korektan parolon en Esperanto. La juna

homo invitis nin sidigi ĉirkaŭ la tablon, sur kiu estis vicigitaj esperantaj libroj kaj revuoj.

Ni interkonatiĝis kaj okupis la seĝojn, parolante nur en Esperanto.

La unua impresio estis kompateca: antaŭ ni staris juna kaj forta homo, kiu ne povis memstare kaj rapide marŝi. Li apogis sin sur ĉirkaŭaj mebloj, kiam devis alporti ion al ni aŭ montri ricevitaĵojn novajn librojn kaj gazetojn.

Ni komencis viglan interparolon pri la E-movado. Mi devas konfesi, ke pli multe parolis la dommastro. Li sentis sin feliĉa parolante Esperanton — eble delonge revis pri tio. Tri horojn ni restis tie, sed ni ne rimarkis la tempon. Petrov parolis flue kaj korekte. En lia personeco ni vidis, kion oni povas fari, kiam oni havas firmon volon kaj laboras diligente kaj konstante. Li rakontis sian malĝojan biografion.

— Mi naskiĝis la dudekan de aprilo 1941 jaro. De naskiĝo mi ne povas movi miajn krurojn. La kuracistoj konvinkis miajn gepatrojn, ke post tri jaroj mi ekiros. Sed vanaj estis miaj esperoj. Efektive post tri jaroj mi ekiris, sed nur per la helpo de miaj gepatroj kaj geparencoj. Havinte sep jarojn, mi komencis viziti la elementan lernejon. Miaj gepatroj ĉiutage akompanis min ĝis la lernejo, atendis min je la fino de la lernohoroj. Kun grandaj malfacilaĵoj kaj penoj mi finis progimnazion. Mi havis deziron daŭrigi mian lernadon. Tiam oni enskribis min en la loka ekonomia teknikumo. Granda perdo por mi estis la morto de mia patro. Li estis solida apogo por mi en la vivo kaj ĉiam insistis, ke mi daŭrigu la lernadon. Nur dank' al miaj amikoj mi finis sukcese teknikumon en 1962 jaro.

La vivo ne ĉesis moviĝi kaj mia sorto estis tia, ke mi sola devis marŝi antaŭen. Tute hazarde mi aŭdis de la

radio, ke estas korespondaj kursoj de fremdaj lingvoj. Mi emas lerni lingvojn kaj tuj komencis studi hispanan kaj Esperanton.

Ricevinte la unuajn kajerojn, mi komprenis, ke Esperanto estas multe pli facile lernebla ol la hispana kaj mi ekamis ĝin. Baldaŭ mi ĉesis studi la hispanan. Kun junula ardo mi ĉiutage lernis diligente ĉiujn lecionojn de Esperanto.

Pro mia malsaneco mi devis de tempo al tempo viziti specialan hospitalon, kie oni esploras mian sanstaton. Tie mi konatiĝis kun tre fidela esperantisto — d-ro Moraresku. Dank' al lia helpo mi povis pli bone ekkoni la lingvon kaj komencis paroli ĝin.

Nun mi estas tre feliĉa, ke per Esperanto mi estas en amikaj rilatoj kun unuloj de diversaj landoj. Mi ne

sentas min for de la kultura vivo, en terura soleco. Pere de miaj korespondantoj mi estas en kontakto kun la tuta mondo. Oni instigas min al vigla kaj ĉiutaga laboro. Por mi Esperanto estas senco de mia vivo.

... Nerimarkite pasis tri horoj en intima iuterparolado. Ni aŭskultis k-don Petrov kaj admiris lian viglecon. Je la fino de nia gastado ni donacis al li memore esperantajn insignon kaj verdan flageton.

Venis la momento por disiĝo — ni devis iri al la stacidomo.

Dum la reveno al la urbo ni multparolis inter ni. Ĉiu profunde meditis pri la miraklo, kiun Esperanto povas fari. Vere, ĝi estas grava spirita valorajo. Vere, ĝi povas esti senco de unu homa vivo.

G. Simeonov

NEKUTIMA EDZIĜFESTO EN ŜTRAKLEVO

*„Al mia dua patro el Hungario,
de via dua filino el Bulgario. . .“*

La dudekan de oktobro 1968 jaro. Malvarma dimanĉo. La edziĝfesto de l' juna paro Julia Bratoeva el Ruse kaj Kiril Georgiev el Ŝtrâklevo altiris centojn da gastoj, kiuj plenigis grandan ejon de la socia nutrado en la vilaĝo. Frunte de la festa manĝotablo, ĉe la nuptopatroj sidis gastoj, venintaj de la aŭstra-hungara ŝtatlimo, el urbo Pécs, Hungario. Tri tagnoktojn ili ne dormis por prepari sin kaj veturi al la geedziĝfesto en Ŝtrâklevo.

... Estis 1966 jaro. La esperantistoj el la aŭtotransporta entrepreno de Pécs invitis gaste — por konatiĝo kaj partopreno en la universala kongreso de la E-junularo — kvin junajn kolegojn el la aŭtotransportaj kolekti-

voj de Ruse. Julia, filino de ŝoforo-esperantisto el la urba aŭtotransporto, estis tiam en la unua kurso de la maŝinkonstrua mezlernejo. Ŝi bone regis la lingvon Esperanto kaj estis unuanime elektita en la grupon por Hungario. En Pécs Julia gastis en la domo de la malnova esperantisto kaj emerita aŭtotransportisto k-do Istvan Foldi.

Kreiĝis intima amikeco inter tiuj du reprezentantoj de la plej malnova kaj plej nova generacio — la 65-jara hungaro kaj la 16-jara bulgarino. Tio estis komenco ankaŭ de intima amikeco inter la du familioj el Pécs kaj Ruse. Sekvis reciprokaj gastadoj en la postaj jaroj.

(daŭrigo sur p. 7)



METAMORFOZO

de Simeon M. Simeonov

Konis mi amikon tre originalan,
kiu havis vivkoncepton plej fatalan —
ĉiujn homojn kun la bestoj li komparis
kaj deklarojn strangajn kun aplombo faris:
„Manĝas ni ne nur por vivaj nin subteni,
sed ni vivas por manĝadi kaj festeni. . .“

Tion volis pruvi li plej elokvente
ne per vanaj vortoj, sed eksperimente:
manĝis li avide, drinkis vinon, brandon
kaj pri tia vivo faris propagandon.
Sed subite granda malfeliĉo venis —
malsaniĝis li kaj plue re festenis:
kun ŝtonetoj en la renoj kaj la galo,
longe li suferis en la hospitalo.
Kaj resaniĝinte post operacio,
li prudente vivis — jam kun nova scio:
„Vivas ni ne nur por manĝi kaj festeni,
sed ni manĝas nur por vivaj nin subteni,
kaj ekzistas ne nur tiu manĝplezuro,
sed alia ankaŭ — meze de l' naturo —
kaj ĝi revigligas, sanon restarigas,
al laboro krea ĉiam nin instigas.“

Tiel li turlst' estiĝis plej fervora,
kun laborkapablo kaj viv' sendolora.
Nun sur niaj montoj ofteli promenas
kaj kun novaj fortoj hejmen ree venas,
al amikoj siaj faras propagandon,
ke belegan nian karan patrolandon
ĉiuj devas ankaŭ per ekskursoj koni,
siajn pulmojn per montar-aer' ozoni,
ĉiam pli kaj pli fortikan sanon ĝui
kaj feliĉan, novan vivon finkonstrui.

NI NE FORGESOS JUI ĈUNOŜIN!

Forpasis tuta jaro, de kiam Jui Ĉunoŝin, malnova japana esperantisto kaj aktiva pacbatalanto, bruligis sin antaŭ da domo de la ĉefministro E. Sato. Per sia sinmortigo s-ano Ĉunoŝin akre akuzis la ĉefministron kaj lian kabineton, ĉar ili perfidas la volon de la japana popolo ne batalante por plena kaj tuja liberigo de insularo Okinaŭa elsub usona milita okupado kaj por ĉesigo de l' usona agresa milito en Vjetnamio. S-ano Jui Ĉunoŝin estis delonga esperantisto kaj unu el la plej aktivaj laborantoj de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM). Li deziris, ke ĉiuj popoloj vivu en paco kaj amika kunlaboro.

Sian tutan havaĵon li oferis al subteno materiala kaj spirita de la vjetnama popolo kaj al tradukoj per Esperanto.

DELEGITOJ DE JEL ĈE PREZIDANTO JONAS

Prezidanto Franz Jonas — ŝtatestro de Aŭstrio — akceptis malgrandan delegitaron de Jtgoslavia Esperanto-Ligo (unu el la aliĝintaj landaj asocioj de UEA) dum sia laŭstatempa vizito en Jugoslavio. Kiel konate, s-ro Jonas flue parolas la Internacian Lingvon. Dum la akcepto, la 30-an de septembro, s-ro Jonas deklaris, ke la rezisto al enkonduko de Esperanto plej ofte aperas ĉe la „oficialuloj“, kiuj, lerninte iun nacian lingvon, opinias tion sufiĉa. „Ili devus konscii — diri prezidanto Jonas, — ke tio ne sufiĉas al la popolo“.

(Informa Servo de UEA № 4)

PETKO PATARINSKI

Je la 2-a de novembro 1968 en v. Ugârĉin, distrikto de Loveĉ, oni celebris solene la 50-jaran datrevenon depost la naskiĝo de la heroe pereinta partizana komandanto Petko Stojĉev Patarinski kun partizana nomo Mirĉo.



La salono de la legejo estis plena. Inter la ĉeestantoj estis sampartizanoj de Mirĉo, liaj parencoj, intimaj amikoj, kamaradoj k. m. a.

La ĥoro ĉe la gimnazio prezentis belan programon. Emocian raporton pri lia vivo, agado kaj heroa morto faris la ekspollikomisaro de la taĉmento de Ĉerven Brjag — docento Toma Stefanov.

Interalie li diris: „Mirĉo restis por maski la malantaŭeniĝon de la taĉmento kun klara konscio pri la neevitebla pereco, sed por savi siajn kamaradojn! Kaj li faris la plej grandan oferon — sian junan kaj helan vivon! Li pereis, sed li savis la taĉmenton!“

Petko Patarinski naskiĝis la 3-an de novembro 1918 en v. Ugârĉin, en la familio de Stojĉo Petkov Patarinski. Elementan lernejon li finis en sia na-

skiĝvilaĝo kaj progimnazion kaj gimnazion — en urbo Loveĉ.

En la gimnazio li iĝis membro de RMS (Laborista Junulara Asocio) kaj membro de la gelernanta abstinencula societo. Tiam ankaŭ li komencis lerni kun granda amo kaj sindonemo la Internacian Lingvon Esperanto.

Petko ofte parolis kun siaj samlernantoj pri Esperanto kaj forte kredis, ke Esperanto estos la lingvo de la laboristoj en la mondo.

Li sukcese finis gimnazion kaj eniris en la vivon. En 1940 li finis sian servon en la kazerno.

Malgraŭ sia malriĉeco en septembro 1941 li komencis studi en la Jura Fakultato de la Sofia Universitato. Ĉi tie li agitis verve pri la Komunista Partio kaj partoprenis en plej diversaj agadoj kontraŭ la faŝista diktaturo. Li estis aktiva membro de BONS (Bulgara Ĝenerala Popola Studenta Asocio).

Petko estis ĉiam unu el la unuaj en la manifestacioj okaze de la festoj de la Liberiĝo — 3. III., de Kiril kaj Metodij — 24. V., de Botev — 2. VI. kaj de la studentoj — 8. XII. kaj ĉiam demonstraciis kontraŭ la faŝismo.

La 14-an de junio 1943 li fariĝis heroa partizano. En la komenco li estis en la stabo de 11-a milit-operacia zono kiel administranto de la fako de informkolektado. Poste estis militinstruiganto kun tasko organizi partizanan batalgrupon en la regiono de Bârkaĉ.

Mirĉo estis brava organizanto kaj amata komandanto.

Petko Patarinski — Mirĉo pereis en la batalo kontraŭ la faŝistoj je la 7-a de januaro 1944 ĉe „Mirjova reka“, en la loko „Radjuvenska Elija“.

Estu eterna la memoro pri la heroo!

J. I. Atanasov



LA MALFACILA TASKO

Rakonto de Ivan Draganov

Estis posttagmeze de la lasta tago de la jaro. Ĝus finiĝis la kunsido de la kooperativa entrepreno „Helaj Radioj“. La direktoro Stajnov informis siajn helpantojn pri la superplenumita jarplano kaj pri la bona financa bilanco de la kooperativo. Poste li menciis, ke dum la sekvonta jaro la entrepreno devas variigisian produktadon kaj siajn modelojn. Por tiu celo oni devas kontaktigi kun aliaj similaj entreprenoj en fremdlando. Tamen ekzistas grava embaraso: kiamaniere komunikiĝi kun homoj el aliaj landoj, ne sciante multajn fremdajn lingvojn? . . . Oficigi diversajn personojn, kiuj scipovas fremdajn lingvojn — tio ja efikus tro malfacile la financon staton de la entrepreno; sendi alilanden reprezentanton, kiu vojaĝos tra la mondo por kontaktigi la entreprenojn kun fremdlando — tio ankaŭ kostus tro multe. Do, kion fari? Malfacila tasko! Ĉiuj devis pensi pri tiu problemo! . . .

Fine la direktoro Stajnov esprimis siajn bondezirojn al ĉiuj ĉeestantoj okaze de la proksimiĝanta Nova Jaro. Poste li turnis sin aparte al la ĉefkontisto kaj petis lin resti ankoraŭ kelkajn minutojn post la foriro de la ceteraj oficistoj. Kiam ili jam estis solaj, li demandis ĝentile:

— Petrov, ĉu vi estas libera ĉi-vespere? Mi invitas vin kaj vian edzinon Nadja veni en mian domon por pasigi kune kun ni la vesperon antaŭ la Nova Jaro. Al mi kaj al mia edzino estus tre agrable, kaj ni tre ĝojus, se vi venos!

— Mi kore dankas al vi kaj mi estas kortuŝita de via atento — respondis Petrov, — sed bedaŭrinde ni ne havas eblon akcepti vian inviton, ĉar mia edzino antaŭ tri horoj jam forveturis al la turista montodomo „Kamen Del“ sur Vitoŝa. Mi ankaŭ devas forveturi tien. Mia tornistro jam estas pretigita. . . Tie ni kune pasigos la vesperon antaŭ la Nova Jaro. Ankoraŭfoje mi tre, tre dankas al vi, sed vi bone komprenas. . . Nadja jam atendas min tie senpacience.

— Jes, tiam — agrablan renkonton de la Nova Jaro! Ĝis revido! — diris la direktoro.

— Ĝis revido! — diris Petrov.

Li iris hejmen, prenis la tornistran kaj tuj forveturis al „Kamen Del“. Atingante la turistan vilaon „Momina Skala“, li direktis sin piede laŭ la vojeto kondukanta al „Kamen Del“, preter la montodomo „Esperanto“. Jam vesperiĝis. Komencis neĝi. Petrov estis gaja — en lia animo regis antaŭnov-

La gastoj de la edziĝfestoj demandis sin, kial tiu ĉi jam maljuna homo estis traveturinta la longan lacigan vojon de la aŭstra-hungara ŝtatlimo por veni en Ruse kaj Ŝtrákvevo kaj kial li aspektis tiel vigla, eble la plej vigla inter la multnombraj gastoj. Ilia scivolemon kontentigis li mem, la gasto el Hungario, kaj lia filino Lici, kiu lin akompanis. Dum la junedzino disdonis donacojn al ĉiuj gastoj, kiuj ankaŭ faris donacojn al la juna geedza paro, la gasto el Hungario notis en sia notlibreto la edziĝfestajn kutimojn de la bulgaraj vilaĝanoj, pri kiuj li nek aŭdis, nek legis. Poste la junedzino kisis la manon de ĉiuj gastoj kaj venis la vico de la gratuloj. La kutima anoncanto ĉe geedziĝo, la patroreprezentanto, donis unue la parolon al Istvan Foldi. Kun edziĝfestaj donacoj surŝultre, staranta, Foldi kun speciala emociiĝo kaj rideto sub la blankaj lipharoj komencis:

— Jam kiam Julia estis nia gastino en Pécs 1966 jaron, ni ekamis ŝin. Ni nomis ŝin nia gastino el Bulgario. . . Poste ni ricevis foton kaj leterojn de Julia. En ili ŝi skribis, ke la domo de ŝiaj gepatroj estas ankaŭ nia domo, ke la pano sur ilia manĝotablo estas ankaŭ nia pano. . .

Kiam la tradukanto el Esperanto prononcis en bulgara lingvo la vortojn de la hungara „patro“ de Julia, preskaŭ ĉiuj homoj viŝadis larmojn en siaj okuloj. Kaj la gasto mem, malproksima laŭ distanco, sed proksima laŭ koro, kun larmoj enokule finis sian paroladon:

— Jen kial mi kun mia filino venis el tiom malproksima loko por partopreni la edziĝfeston de Julia. La distanco forigis Esperanto, la lingvo de paco kaj amikeco, kiu kunligas la homajn korojn. . .

J. Kalinov

jara bonhumoro. Li paŝis rapide.

Sed jen subite malagrablaĵo. Li glitiĝis kaj falis teren. Provinde levi sin li eksentis akutan doloron en unu el la piedoj, kiu ne plu obeis. . . Li ekĝemis akre. La doloro fariĝis pli kaj pli intensa. Petrov restis surloke kelkan tempon, poste faris novajn provojn levi sin, sed vane. Miloĵ da neĝeroj dancante falis teren, karesis lian vizagon kaj kvazaŭ flustris: „Ekdormu, nu ekdormu, ripozu iomete!“ Kaj li svenis. . .

Tiutempe en montodomo „Esperanto“ regis antaŭfesta humoro kaj aŭdiĝis gaja parolbruo. En unu angulo de la ĉambro ĝojkriis kaj ridis infanoj, en alia angulo viroj ludis ŝakon. La virinoj amuzis sin siamaniere. Inter ili troviĝis ankaŭ la kuracistino Lena, kies medicinista teko, ĉiam plena kaj preta, kuŝis apud ŝi. La radioricevilo ankaŭ plintensigis la bonhumoron per siaj disaŭdigoj. La murhorloĝo jam rememorigis, ke estas tempo por vespermanĝo, tamen ĉiuj atendis la alvenon de ankoraŭ du amikoj — Ljubo kaj Koljo, kiuj estis malfruigintaj.

Finfine jen ili venas. Sed kio okazis?! Koljo eniris la ĉambron anhelante. Li tuj turnis sin al la viroj kaj alarme ekkriis: — Homo en danĝero! Venu tuj! Ljubo restis ĉe li.

La viroj rapide saltis kaj eliris. Iu prenis kun si la brankardon. Akompanis ilin ankaŭ la kuracistino Lena, kiu ne forgesis sian tekon.

Post duonhoro ĉiuj revenis en la montodomon, portante la suferanton en la brankardo. Li estis jam rekonsciiginta. Post mallonga ripozo li klarigis al la kuracistino, ke la doloro en la piedo daŭras. Denove Lena atente esploris kaj konstatis, ke la osto ne estas rompita, nur la artikolo estas tordita. Bandaĝinte ĝin ŝi donis al la suferanto medikamenton kontraŭ la doloro, alian — por fortikigo de la koro kaj diris:

— Estu trankvila! Post kelkaj tagoj vi estos tute sana.

Tiam ambaŭ amikoj Koljo kaj Ljubo rakontis, ke irante laŭ la vojeto, ne malproksime de montodomo „Esperanto“ ili aŭdis ĝemojn. Flanke de la vojeto kuŝis surdorse homo, preskaŭ kovrita de la abunde falanta neĝo. Se ili ne estis vidintaj lin ĝustatempe, li nepre riskus pere i pro frostiĝo. . .

La stato de Petrov iomete pliboniĝis. Denove li demandis pri sia edzino klarigante, ke ŝi atendas lin en montodomo „Kamen Del“. Kaj ree petis, ke iu anoncu al ŝi pri la malbona okazintaĵo. . .

Nadja baldaŭ venis, akompanita de triopo el la novaj konatoj. Petrov emociiĝe brakumis ŝin kaj ĝoje ekridetis. La bona humoro de ĉiuj reaperis. Petrov kaj Nadja komprenis, ke ili troviĝas inter bonaj homoj — esperantistoj-turistoj, kiuj parolis nekonatan

lingvon — Esperanto. Oni tuj klarigis al ili la celon de tiu lingvo.

Komenciĝis komuna vespermanĝo. Poste la infanoj deklamis. Ĉiuj kantis kaj dancis. Nadja kaj Petrov sentis sin tre kontentaj. Ili ja havis novajn kaj bonajn amikojn!

La montriloj de la murhorloĝo jam indikis noktomezon. La radio anoncis:

— Feliĉan Novjaron!

Ĉiuj komencis reciproki gratulojn kaj bondezirojn.

En tiu momento la pordo malfermiĝis kaj eniris Avo Frosto. . . Li estis en longa blanka peltvesto. Surkape — blanka peltĉapo, sur kies frunto brilis argenta stelo. Lian bruston ornamis granda verda kvinpinta stelo. Surdorse li portis plenan sakon. Avo Frosto havis longan blankan barbon.

— Bonan vesperon kaj feliĉan Novjaron, bonaj homoj! Mi venis por saluti vin, disdoni donacojn, sed unue ĉiu el vi devas promesi ion. . .

Kompreneble, unue la infanoj komencis promesi kaj ricevi siajn donacojn. Ili ĝojis plej multe.

Post la infanoj komencis promesi la virinoj. Iliaj promesoj estis tre amuzaj.

Kaj jen venis la vico de Nadja. Ŝi ankaŭ devas doni promeson. Sed kian? En tiu momento subite al ŝi venis trafa ideo. Ŝi klinis sin al sia edzo kaj flustris ion al li. Ridetante li kapjesis. Nadja iom ruĝiĝis kaj deklaris antaŭ ĉiuj:

— Se mi naskos filinon, mi nomos ŝin Esperantina!

Ĉiuj brue aplaudis. Tiam ŝi ankaŭ ricevis donacon de Avo Frosto.

Poste Avo Frosto disdonis donacojn ankaŭ al la viroj.

Proksimiĝinte al Petrov, li diris:

— Vi estas gasto, sed malgraŭ tio vi ankaŭ devas promesi ion. Nu, kion vi promesos? Petrov fiere respondis:

— Mian novan vivon mi nun ŝuldas al tiuj ĉi sinceraj, bravaj kaj simpatiaj geamikoj — esperantistoj-turistoj. Mi promesas lerni ilian lingvon Esperanto kaj batali kune kun ili per Esperanto por la paco inter la popoloj.

Ĉiuj denove aplaudis.

Avo Frosto donacis al li pakajon. Petrov rapide malpakis ĝin — interne estis lerno-libro de Esperanto.

Kiam li sciigis al siaj novaj amikoj, kion komisiis al li la direktoro Stojanov, ili klarigis, ke dank' al Esperanto li povus facile kontakti kun ĉiuj alilandaj komercaj entreprenoj pere de siaj estontaj korespondantoj.

Tre kontenta pri sia donaco, Petrov estis ankaŭ mirigita kaj tre surprizita, kiel rapide kaj neatendite la hazardo helpis al li solvi la malfacilan taskon.



Lastatempe la agado de la Distrikta E-Komitato en Kjustendil estas karakterizata de granda aktiveco. Tion la distrikta organizaĵo atingis nefacile. Longan tempon la distrikta estraro vivis tre anemie. Ĝi ekzistis, sed ne agis Rajte oni nomis ĝin „surpapa komitato“.

Per la elekto de nova DK en marto j. k. estis farita decida ŝanĝo en la agado de l' organizaĵo. La noveelektita prezidanto Georgi Kaŝukeev, malnova esperantisto, dum nelonga tempo sukcesis konatigi nian noblan agadon al preskaŭ ĉiuj politikaj kaj administraj organoj en la Distrikto. Ili jam havas pozitivan rilaton al Esperanto. Kelkaj organizaĵoj

kaj oficejoj promesis finance subteni la distriktan E-organizaĵon, kio helpos ĝian plensangan ekvivon.

Karakteriza por la E-societo en urbo Stanke Dimitrov kaj en la vilaĝoj Ŝatrovo kaj Panĉarevo estas tio, ke ili grave plibonigis sian agadon.

Kiel kroniĝo de ĉiuj niaj sukcesoj estis la kunsido en la distrikta fako „Popola Instruado“ komence de oktobro, en kiu oni decidis enkonduki fakultativan instruadon de Esperanto en tiuj lernejoj, kie estas diplomitaj E-instruistoj. Kelkloke la instruado fakte komenciĝis.

Ni kredas atingi brilajn sukcesojn por Esperanto en la Distrikto de Kjustendil,

Ivan Filev

III STUDENTA KONFERENCO EN RUSE

De 18—20 de oktobro j. k. en Ruse okazis la tria konferenco de la bulgaraj studentoj-esperantistoj sub la alta protekto de la rektoro de Supera Instituto por Agrikulturaj Maŝinoj prof. Marko Todorov.

La konferencon salutis prof. St. Petrov — vicrektoro de la sama instituto, ing. E. Bivolarov — reprezentanto de Komsomolo, ing. B. Leonov — prezidanto de STELO, Ĥr. Ĥristov — prezidanto de la Distrikta E-Komitato en Ruse, Marie Bourdier — lektoro de franca lingvo kaj Esperanto en Supera Ekonomia Instituto en Sviŝtov, reprezentantoj de la studentaj E-societoj en Sofia, Sviŝtov, Smoljan, Veliko Târnovo. La konferencanoj estis afable akceptitaj de la rektoro prof. M. Todorov, kiu konatigis al ili la historion, nunan staton kaj perspektivojn de la Instituto.

Raportojn faris k-do Coĉo Kolarov el Sviŝtov — pri la agado de la studentoj-esperantistoj dum la periodo inter la II kaj III konferencoj, ing. Boĵidar Leonov — pri la 53-a E-kongreso en Madrido, la 24-a TEJO-kongreso en Taragona kaj la III STELO-koongreso en Aix en Provence. En la diskutoj oni faris multajn kritikojn, proponojn kaj rekomendojn por pli aktiva estonta agado.

Interesan raporton je temo „La sciencetika informado — grava elemento de la teknika progreso“ faris la juna ing. Jordan Kazakov el Ruse.

Dum la konferenco estis aranĝitaj balo, ekskursoj per ŝipo sur Danubo kaj sportkonkuroj.

B. K.

LA VERDA FLAGETO — EN VIDEBLA LOKO

Je la 15-a de septembro j. k. grupo da esperantistoj el Jambol forveturis al frata Polujo. La ĝojo estis granda. La verda flageto estis en videlba loko en la kupeo. Ĉiu pasaĝero vidante ĝin ekinteresiĝis, kaj ni kun plezuro klarigis, ke ĝi signifas amikecon inter la homoj, pacon en la mondo.

La vagonaro rapide flugis al nia esperanta celo.

En Varsovio ni renkontiĝis kun multaj gesamideanoj kaj ni konstatis, ke jambolanoj ankoraŭ multon devas fari por Esperanto. Ni ekdeziris, ke ambaŭ societoj havu daŭrajn kontaktojn. Speciale ni, la esperantistoj en

Jambol, volas pruvi, ke Esperanto vivas ne nur en la grandaj urboj (kiel opinias iuj polaj geamikoj), sed ankaŭ en la malgrandaj urboj.

Reveninte en nian landon ni havas kion rakonti al niaj gesamideanoj. Kun plezuro ni rakontas pri la gastamaj polaj geamikoj Tereza, Jurek, Zigireevič el Varsovio, pri Maria kaj ŝia fratino el Gdansk, kiuj tiel afable helpis nin dum nia restado en Pollando.

Neniam ni forgesos ĉion viditan kaj travivitan.

St. Panajotova

KELKAJ PENSOJ PRI NIA E-AGADO

Dum la lastaj jaroj nia E-movado notis multajn sukcesojn. Pri ili oni parolis multfoje. La 37-a Kongreso subtekstis ankoraŭfoje, ke estas sendubaj sukcesoj en ĉiu sektoro de nia asocia agado. Kompreneble, ĉiu ĉi nur povas ĝojigi nin, sed ĝi ankaŭ ne devas trofierigi kiun ajn.

Estas sciata, ke niaj sukcesoj povas esti pli grandaj kiel en la propagando, tiel ankaŭ en la instruado de Esperanto. Por tio tamen ne sufiĉas nur ricevado de E-gazetaro, sed estas necesa ankaŭ ĝia plej atenta legado, precipe nian asocian organon „Bulgara Esperantisto“. Memkompreneble, ke la estraroj de la E-societoj devas ofte pridiskuti en kunsidoj la ĉefartikolojn kaj la pli gravajn organizajn materialojn, kiuj aperas en „BE“.

Regula enkasigo de la membrokotizo, konstanta plimultigo de la abonantoj, regulaj ĉiusemajnaj renkontigoj, internacia korespondado, rekta montrado de praktika utiligo de la lingvo, preparado de kursgvidantoj, konsekvenca kaj ekzakta plenumado de la decidoj de l' Kongreso — jen konstantaj taskoj, kies solvo garantias pluan plialtigon de l' aŭtoritato de la E-movado.

Kaj vi, amiko esperantisto, ne forgesu: ne sufiĉas, ke nur vi estu bona esperantisto. Vi devas klopodi ke ankaŭ la aliaj fariĝu bonaj esperantistoj. Ne fieriĝu, sed helpu vian amikon, konaton, najbaron, familianon, parencon! Esperantisto — tio estas sindona homo. Agu ankaŭ vi sindone!

T. K. — G. Orjaĥovica

TRA SOVETUNIO

La 3-an de septembro 1968 la Esperanto-komisiono de Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksteraj Landoj aranĝis sian fondon kunsidon. La kunsido konfirmis la statuton de la Esperanto-komisiono kaj akceptis laborplanon por la dua duono de 1968 kaj la komenco de 1969. Kiel prezidanto de la Esperanto-komisiono per voĉdonado estis elektita la verkistino Nadja Mykolajivna Andrianova.

La Esperanto-komisiono komencis eldoni la informan pres-bultenon „Tra

Soveta Ukrainio“ en Esperanto (ĝis nun ĝi aperadis kvarlingve: ukraine, ruse, angle kaj france). Sekvontjare la bulteno aperados dumonate kaj informos pri vivo, laboro kaj prospero de Ukrainio. Ĝi enhavos ankaŭ elukrainiajn E-novaĵojn.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kunĝojas niajn ukrainiajn amikojn pro tiu atingajo kaj frate bondeziras al ili novajn sukcesojn.

Ĉi sube ni donas materialojn el la pres-bulteno № 2.

URBO DE KULTURO

Kievo estas granda kulturcentro de Soveta Ukrainio. Ĉi tie loĝas kaj laboras multenombraj mastroj de l'arto. Nur en teatraj muzikaj institucioj laboras pli ol 1530 artistoj.

750 arkitektoj sin okupas pri konstruado de ĉefurbaj konstruaĵoj, arkitekturaĵoj.

Kaj en pentrado, grafikarto kaj aliaj ĝenroj

de plastika arto kree laboras ĉirkaŭ 670 artistoj.

En Kievo loĝas 430 majstroj de la vorto — poetoj, prozistoj, dramaturgoj, kritikistoj.

En kreado de unu el la plej popularaj ĝenroj de la arto — la kino — partoprenas 336 kinematografistoj.

Ankaŭ multnombra trupo de komponistoj (95) laboras en la ĉefurbo de Ukrainio.



En fakoj de la Suda tubo-produktada uzino (la urbo Nikopolo) estas brigadoj, en kiuj ĉiuj membroj havas ĝeneralan mezgradan aŭ mezteknikan klercon. En la brigado de lamengistoj de la maŝtro H. Bahno ĉirkaŭ 10 laboristoj diversjare finis superajn lernejojn. Diplomitaj laboristoj estas preskaŭ en ĉiu brigado.

Ĉiujare en la entrepreno kreskas la nombro de laboristoj, kiuj lernas laborante. Nun preskaŭ 800 laboristoj lernas en korespondkursaj fakoj de superaj lernejoj kaj teknikaj mezlernejoj. Lastjare la uzino sendis lerni en superajn lernejojn 135 avangardajn laboristojn. Post la fino de sia lernado en superaj lernejoj ili revenos labori en saman entreprenon.

El „Tra Soveta Ukrainio“

ESPERANTO EN GDR

En oktobro 1968 d-ro Boris Nedkov el Sofio vizitis la ejon de Centra Laborrondo Esperanto de Germana Demokratia Respubliko (GDR) en Berlino. Li starigis kelkajn demandojn al la germanaj kamaradoj kaj ili estis tiel afablaj respondi ilin. Ĉi sube ni publikigas la respondojn.

1. La Germana Laborista Esperanto-Asocio estis malpermesita en 1933 per faŝista dekreto. Tri jarojn poste la burĝa Germana Esperanto-Asocio estis same malpermesita per dekreto de Bormann.

En GDR la lingvo — kontraŭe al diversaj prezentoj — neniam estis malpermesita. La tempo por krei organizajn formojn por la laboro de la esperantistoj en GDR naturiĝis nur en la lastaj jaroj. La kaŭzoj: devis esti forpasintaj la stalinaj konceptoj pri la rolo de la Internacia Lingvo; due, la fakto, ke sur germana tereno ekzistas du diverssistemaj ŝtatoj, tre specifike la situacion en GDR ne nur rilate al Esperanto-movado. Do formala komparo kun la evoluo en aliaj socialistaj landoj ne eblas.

Jam en 1960 la Germana Packonsilantaro pozitive okupiĝis pri Esperanto. Tiam ni ankaŭ eldonis unu numeron de „Paco“ kaj diversajn aliajn materialojn.

2. En 1965 estis kreita sub la gvido de eminentaj kaj bonaj kamaradoj, iamaj membroj de la tradicihava Germana Laborista Esperanto-Asocio, la Centra Laborrondo Esperanto de GDR en la Germana Kulturligo.

3. CLR estas la plej supera E-gvidorgano en GDR. En la distriktoj ekzistas 12 distriktaj laborrondoj, kaj en ĉirkaŭ 50 subdistriktoj (urboj) — subdistriktaj laborrondoj kun entute ĉirkaŭ 150 kluboj kaj grupoj. En GDR estas eble organizitaj — laŭ nekompleta statistiko — 2000 esperantistoj.

4. Tiu organiza formo (sekcio de la Germana Kulturligo) elproviĝis kiel tute bona. La esperantistoj en GDR ne esprimis deziron trovi alian organizan formon ĝis nun. Do la

nuna formo eble certgrade respondas al la organizaj formoj en diversaj socialistaj landoj.

5. La plej aktivaj grupoj ŝajnas esti en Karl-Marx-Stadt, Rostock, Potsdam, Schverin, Dresden kaj Leipzig.

6. Ni eldonis lernolibron, vortaron esperanta-germanan, broŝuron „La germana popolo kaj Unuiĝintaj Nacioj“ (kun tre interesa internacia eĥo), 26 numerojn de „Der Esperantist“ k. s. Ekzistas magnetofona servo. Ni planas eldoni vortaron germana-esperantan, novajn lernolibrojn, libron pri la karaktero kaj evoluo de nia ŝtato kaj aliajn materialojn, kiuj respegulos la pacan evoluon de nia ŝtato sur ĉiuj terenoj. Krome, kompreneble, ni eldonos en 1969 — la 4-an fojon jam — tre lukse numeron de „Paco“.

7. En Germana Ŝtatbiblioteko de Berlin (GDR) troviĝas 2—3000 esperantaj verkoj kaj gazetoj, savitaj disde de la faŝistoj. Ni penas en CLR pretigi malgrandan bibliotekon. En Deutsche Staatsbibliothek Dresden troviĝas granda kolekto de esperantaĵoj, same en la bibliotekoj de Leipzig, Rostock kaj aliaj universitataj bibliotekoj. Ni planas verki katalogojn pri ĉiuj.

8. Niaj ĉefaj taskoj ĝis nun, kompreneble, estis plifortigi la grupojn en la propra lando mem. Ni do ankoraŭ devas solvi multajn internajn problemojn. Tamen pliaktiviĝos nia internacia laboro. Kij ni tre alstrebas bonan kunlaboron speciale kun la frataj socialistaj landoj, do speciale ankaŭ kun la amikeca Bulgario. Kompreneble, ni ankaŭ estas pretaj por kontaktoj kun ĉiuj landaj asocioj surbaze de egalrajteco. Tre grava laŭ nia opinio estas la decida plifortigo de MEM.

9. Ni nun aparte esperas, ke profundiĝos plue la bonaj kaj tradiciaj kontaktoj inter la esperantistoj de Bulgario kaj GDR en servo de la paco kaj por la bono de ambaŭ landoj.

INTERNACIA KONFERENCO PRI LA HOMAJ RAJTOJ EN SONNENBERG

Pli ol 80 personoj el 16 eŭropaj landoj, inter kiuj ankaŭ el Bulgario, Jugoslavio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Japanio kaj Usono, partoprenis la internacian pedagogian konferencon de la 20-a ĝis la 29-a de septembro 1968 en la Internacia Domo Sonnenberg, Germanio (GFR). Organizanto de la konferenco, kies ĝenerala temo estis la „Fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj“, estis la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj sub la gvidado de rektoro Helmut Sonnabend kaj instruistino Karin Ruff, Nettlein.

La ministro por kulturaj kaj edukaj aferoj de la germana federacia lando Niedersachsen (Malsupra Saksujo) transprenis la altan protektadon de la konferenco. Diversaj germanaj instancoj, inter ili la rektoroj de du germanaj universitatoj, sendis salutleterojn.

Prof. d-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de UEA, faris tri prelegojn, kiuj traktis la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj kaj ĝian enkorpiĝon en la juro de la nacioj, la malbonajn sekvojn de la lingva diskriminacio en la internaciaj rilatoj kaj elstarigis la Internacian Lingvon kiel efikan rimedon de interpopola rilatado. La du prelegoj de d-ro Werner Bormann, Hamburg, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, substrekis la gravan signifon de la

ekonomiaj faktoroj kaj iliajn influojn al la homaj rajtoj.

Ĉirkaŭ 50 ĉeestintoj estis instruistoj kaj pedagogoj. Grandan intereson trovis la prelegoj de docento G. Dimov, Varna (Bulgario), pri „Lingvoinstruado kaj edukado per Esperanto“ kaj „Modernaj metodoj por instruado de Esperanto“, kaj tiu de d-ro A. Gauder (Hungario) pri la „Aŭtomata gramatiko“. La prelegoj ne trovis ĉies konsenton. El la diskutoj montriĝis, ke ne ekzistas „la plej bona metodo“, devas esti granda varia elekto. La sukceso ĉefe dependas de la instruisto. Metodikajn aferojn traktis ankaŭ la diskutrondo pri lernejaĵaj aferoj, kiun gvidis prof. Rudolf Rakuša, Maribor (Jugoslavio).

Pri lernejaĵaj problemoj en la evoluantaj landoj kaj diversaj metodoj de unuopaj ŝtatoj rilate al la evoluhelpado kompetente parolis prof. d-ro Neergard, Kopenhago. D-ro Victor Sadler, Rotterdam, prezentis siajn argumentojn pri la lingvaj baroj al literaturaj interŝanĝoj inter la popoloj.

Post ĉiuj prelegoj sekvis viglaj diskutoj. Grupo da ĉeestantoj utiligis la okazon ekzerci sin en la arto de simultana tradukado.

La konferenco finiĝis per Varia Vespero. Pri la sukcesa konferenco raportis la televido, radio kaj gazetararo.

Laŭ Pilo Press

МИНИСТЕРСТВО НА СЪОБЩЕНИЯТА

№ С-7-1023

София, 13. XI. 1968 г.

ДО
НАЧАЛНИЦИТЕ НА ОКРЪЖНИТЕ
УПРАВЛЕНИЯ НА СЪОБЩЕНИЯТА
И СПЕЦИАЛИЗИРАНИ ПТТ И Р-
ПРЕДПРИЯТИЯ

Международният пощенски есперантски съюз, със седалище гр. София, предлага в учебните заведения и предприятията на съобщенията, поради това, че имат непосредствена връзка с туристи от други държави, да се организират за желаещите курсове за изучаване на езика есперанто.

Ръководството на Министерството на съобщенията препоръчва на учебните заведения и предприятията да разгласят сред учащите се, работниците и служителите значението и важноста на международния език есперанто и да съдействуват на есперантските дружества за организиране на курсове за изучаване на езика, като съобразно възможностите си им осигурят кабинети, пособия, лектори и др.

Министър: *Ст. Тончев*



La Internacia Poŝtista Asocio, kun sidejo en Sofio, proponas, ke oni organizu kursojn de Esperanto en la lernejoj kaj entreprenejoj de la Ministerio de Komunikado, ĉar ili havas senperan kontakton kun turistoj el eksterlando.

La Estraro de la Ministerio rekomendas al siaj lernejoj kaj entreprenejoj diskonigi inter la gelernantoj, laboristoj kaj oficistoj la signifon kaj la gravecon de la Internacia Lingvo Esperanto kaj helpi la Esperanto-societojn organizi kursojn por lernado de la lingvo, laŭ siaj eblecoj disponigante al ili kabinetojn, helpilojn, lektorojn ktp.

Ministro: St. Tonĉev

ОКРЪЖЕН НАРОДЕН СЪВЕТ

отдел „Народна просвета“

№ V 2815

7. X. 1968 г.

гр. Кюстендил

До Директора

на основно училище

гр. (с.)

Съвременните международни врѝзки и широкият културен и стопански обмен на нашата страна с други държави налагат необходимостта да се изучават в училищата и по самостоятелен път най-различни езици.

Между тези възможности изучаването на международния език есперанто е едно благоприятно и полезно мероприятие. Езикът есперанто има много опростена граматика, богат речников фонд и логическо устройство на фразата, които го правят лесно усвояем. Благодарение на тези му качества много езиковеди и държавници са изразили своето положително и благосклонно отношение към този език и препоръчват неговото изучаване. В България есперанто също се изучава в много училища, а в Софийския университет има открит лекторат.

За изучаването му в училищата МНП е изготвило специална програма.

Лесното усвояване на езика дава прекрасна възможност на голяма част от учащите се да го използват в своите кореспондентски и други врѝзки с хора от най-различни страни и народи, с което се съдействува за тяхното интернационално и комунистическо възпитание.

Във врѝзка с горното отделът проведе съвещание с директорите на училищата в двата града и се взе решение да се въведе факултативно изучаване на есперанто в училищата както следва:

I основно у-ще, Кюстендил — една група с ръководител Ев. Анчев;

III основно у-ще, Кюстендил — една група с ръководител Ев. Анчев;

Икономически техникум, Кюстендил — една група с ръководител М. Попов;

Техникум по обществено хранене, Кюстендил — една група с ръководител М. Попов;

Базово у-ще, Станке Димитров — една група с ръководител Томанов;

Основно у-ще „Е. Георгиев“, Станке Димитров — една група с ръководител Томанов;

I-ва политехническа гимназия, Станке Димитров — две групи с ръководител В. Гергинов;

с. Гюешево — една група с ръководител Кокалински;

с. Шатрово — една група с ръководител Николов;

КГ с. Трекляно — една група с ръководител Лилка Георгиева;

СПУ с. Рила — една група с ръководител Ц. Мургин;

с. Мърводол — една група с ръководител Н. Фалова.

Задължават се директорите да провеждат разяснителна работа всред учителите и да наберат необходимия брой ученици за факултативно изучаване на есперанто, а също така да оказват пълно съдействие на преподавателите за правилното провеждане на обучението по езика.

Началник отдел „НП“: Г. Масларски

Abonigo al „Bulgara Esperantisto“ ankoraŭ ebla. Tuj sendu abonkoti-
zon al la kancelario de BEA!

KIEL FARIĜI MALSANA
Konciza gvidilo por komencantoj
de N. Tambian

Multaj miloj da libroj estas verkitaj pri tio, kiel konservi la sanon. Nu, sed kiamaniere... malsaniĝi? Kiel defendi sian malfortiĝantan organismon kontraŭ resaniĝo? Pri tio estas eldonita nek unu presita verko... Tamen ĝi estas urĝe bezonata: nur esplorrigardu, kiom da homoj per ĉiuj fortoj penegas malpli-longigi sian vivon... Ceterc, jam en la Antikva Epoko la filozofo Seneka asertis, ke „mallongedaŭran vivon ni ne ricevis, sed mem kreas“. Pli moderna aŭtoro — D. Lebbok — kalkulis, ke la kvanto da homoj, kiuj pereigas sin mem, estas sufiĉe pli granda ol tiuj, pereigitaj fare de aliaj. Al tiuj „sinpereiguloj“ ni adresas tiun ĉi koncizan gvidilon, por ke ili evitu diletantecon, starigu sin sur la firma fundamento de la scienco.

Ni komencu esplorante, kiel oni nutru sin, por plej sukcese subfosi sian sanon. Tre efike por tiu celo estas forveturadi al la laboro trinkinte hasteme nur glason da teo kaj forglutinte butterpanon. Tamen plej bone estas tute ne manĝetadi. Sed jam dum la tagmanĝa interrompo ĉiam manĝu ĝis plensato kaj same dum vespermanĝo, ĵus antaŭ la enlitiĝo. Se dum vespermanĝo elĉerpiĝas iu fritita kolbaso, tiam kuraĝe transiru al lardo, grasa anaso aŭ fritita ŝafaĵo. Ĝuste tiel kondukas ĉiuj kandidatoj por apopleksio aŭ infarkto.

Se via stomako estas delikata kaj sentema kiel ĉe suĉinfano, vi verŝajne ne tuj sukcesos venki tiujn manĝojn. Konsilo: enlitiĝu du horojn pli malfrue ol kutime. Kompense vi malbone dormos kaj spertos maltrankviligajn sonĝojn. Via superplena stomako premas sur la diafragmon kaj malhelpas normalan funkciadon de la koro kaj pulmoj. Jen la paŝo al la celo! „Dolĉe manĝanta, sed malbone dormanta“ —

kiel diras la popolo.

Ekzistas ankaŭ pluraj metodoj por difekti la koron. Bedaŭrinde, ne estas tiel facile tion atingi: diable eltenema ja estas tiu organa motoro! Tamen plej bone kontribuas al tio la dikiĝo. Imagu nur iun, kiu dum varmega vetero promenadas en fela pelto kaj krom tio surŝulte portas pezan ŝarĝon. Ĝuste en la sama situacio troviĝas la korpulentuloj.

Malfortigi la koron kaj pulmojn: ĉi tie helpas la fumado. Unu sola paketo da cigaredoj, konsumita dum unu tago, preskaŭ duobligas koratakojn kaj rimarkeble plialtigas viajn ŝancojn por pulmokancero. Nenio detruas la homan organismon pli rapide kaj pli efike ol nikotino kaj alkoholo — ili do estas fidelaj amikoj por via celo.

Se viaj intencoj estas vere seriozaj, tiam eviiu ĉiun fizikan laboron aŭ ekzercon. Preferu la sid-kuŝan vivmanieron kaj malbenu piediradon, ĉefe supren laŭ ŝtuparoj.

Ankaŭ gravas plej ofte pensadi kaj paroli pri siaj malsanoj — realaj kaj imagitaj — kaj seninterrompe sugesti al si mem kaj al ĉiuj konatoj, ke tagon post tago via sano degeladas, ke la medicino estas senhelpa. Nepre disputu kun ĉiuj pri ajna bagatelo, estu malĝentila kaj malbonhumora, taŭzu la nervojn al aliaj kaj, kompreneble, al vi mem.

La plej bona loko por la dimanĉa ripozo sendiskute estas divano. Al ĝi cedas nur drinkado dum kart- aŭ domenludo. Kaj neniajn ekskursojn en la naturo! Dumsemajne, reveninte post aboro, ankaŭ eksidu plej komforte en fotelon kaj rigardu televidelsendojn — ĉiujn laŭvice! Kaj se vi ekdezirus iom dormeti (ĉe la nunaj televidprogramoj ĝi estas neevitebla!) — ne kontraŭstaru, akceptu la horizontalan staton kaj... plifortigu vian malsanon!

El „Heroldo de E-to.“, 20/68



PRI LA MUSETO, KIU ESTIS PLI SAĜA OL LA HOMOJ, PLI FORTA OL LA KOKO KAJ PLI KURAĜA OL LA KATO

Novjara rakonto de
Ljudmila Paspaleeva

En la nokto de la Nova Jaro, kiam ĉiuj en la domo ekdormis, desur la novjara laboro malaperis: unu nukso, pakita en staniolo, unu eta ĉokolado kaj unu mandarineto.

Matene la infanoj ne rimarkis iun ajn kaj la novjara laboro tute ne povis rakonti al ili pri la griza museto Rodulo kun elstarantaj rozkoloraj oreletoj. Tiu museto alproksimiĝis laŭ la vojeto, kiun la lunradioj desegnis sur la planko. Li haltis en ekstazo antaŭ la ornamita laboro, palpebrumis kelkfoje kaj subite ekkriis pro ĝojo:

— Ha! Ĉi tio estas vera bonŝanco. Nun la tuta musa gento estos en miaj piedoj. Ĉiuj klinsalutados min, ĉiuj min estimos kaj tremos de mi!

Poste li ruligis antaŭen unu mandarineton, dekroĉis unu nukseton kaj unu ĉokoladeton, kaptis la fadenojn, per kiuj ili estis pendigitaj, kaj fortrenis ilin al la alia rando de la domo.

La sekvan nokton la museto denove venis ĉe la novjara laboro kaj denove dekroĉis nukson, ĉokoladon kaj mandarinon. Tio ripetigis la trian nokton, la kvaran, la kvinan. . . ĝis kiam sur la branĉoj de l'laboro restis nek unu mandarino aŭ ĉokolado, aŭ nukso. La infanoj estis rimarkintaj, ke la ornamaĵoj malmultiĝas. Sed kion ili povis fari? Ĉiun tagon ili miradis kaj fine decidis, ke tio estas iu sorĉafero. Ilia panjo tamen ridetis. Ŝi supozis, ke la infanoj ilin formangiĝis kaj nun simulas.

Dume la gloro de la malgranda Rodulo ĉiam pli kaj pli kreskis inter la musa gento. Li sidis sur la balkoneto, kiun li mem faris el biskvitskatolo, kaj

redis jen nukson, jen ĉokoladon, jen levis glaseton kun mandarinsuko. La musoj rigardis supren — iuj pro sciivolemo, aliaj pro envio.

— Eĉ la homoj ne nutras sin nur per tiaj bongustaj manĝaĵoj — ili kaŝe parolis inter si. — Roĉjo estas pli riĉa ol la homoj. . .

Iuj vizitis lin gaste por konvinkiĝi de proksime. Poste ili adiaŭis lin kun estima klinsaluto. Ankaŭ kiam la musoj preterpasis la balkonon de la museto, ili klinsalutis. Fine ili aranĝis dediĉe solenaĵon. Ĉiuj kolektiĝis antaŭ lian domon, komencis aplaŭdi kaj krii:

— Vivu!

Unu rato premis al li piedon:

— Estimata Rodulo, tiu ĉi solenaĵo estas je via honoro — li diris. — Ni estas feliĉaj, ke inter ni vivas tia museto. Mi petas vin, rakontu kiel vi fariĝis pli riĉa ol la homoj!

Roĉjo fiere levis la kapon:

— Mi estas pli riĉa ol la homoj, ĉar mi fariĝis pli saĝa ol ili. Ĉiutage mi tralegis po paĝo de unu tre dika libro. Ĝi havis tricent sesdek kvin paĝojn — ĝuste kiom estas la tagoj de la jaro.

El la rando subite aŭdigis voĉon unu maljuna najbarino:

— Diru, kara mia, kiel vi tralegis ĝin? Kiel vi sukcesis? Pasintjare, dum la Nova Jaro, vi ankoraŭ ne estis naskita!

La musoj kaj la musetoj ekbruis:

— Silentu, avinc! Vi ne scias!

— Mi scias, mi estas lia najbarino.

— Ne gravas.

Rodulo atendis, ke ili silentigu, kaj daŭrigis frapante al si la bruston:

— Mi estas pli saĝa ol la homoj, pli

forta ol la koko kaj pli kuraĝa ol la kato. Vi konvinkigos.

— Brave! Brave! — aplaŭdis la publiko.

Kaj dum la sekva nokto malaperis la ruĝa sukera koketo. Matene la musoj mirkriis pri la forto de sia kunfrato. Sur lia balkoneto staris humile ligita ruĝa koko. Nun ili rigardis supren ne nur kun estimo, sed ankaŭ kun timo. Eĉ la maljuna najbarino preterpasis malproksime.

„Mi donos al vi instrukcion, kiel estimi min!“ — minacis la museto dum la tuta tago. Kaj la nokton, tuj kiam la musoj enhejmiĝis, ĝi anhelante alkuris la novjaran arbeton.

Li etendiĝis kaj la blanka, glacea kato ekstaris sur la tapiŝo. La museto derompis kelkajn branĉetojn kaj ekkomandis:

— Antaŭen!

Poste kondukis la katon per la fadeno kiel per brideto kaj sentis neordinaran forton.

Matene la preterpasantoj ekvidis plej grandan miraklon: sur la balkono de Rodulo estis kato. Ili tuj diskonigis la novaĵon. Iuj rimarkis la branĉetojn el la novjara arbo. La museto intence lasis ilin tie — li sciis, ke ili estos necesaj. El la branĉetoj la musoj plektis kronon kun surskribo kaj kolektiĝis al nova solenaĵo. La museto fiere eliris antaŭ sian domon, tirante post si la katon. La musoj tondre aplaŭdis.

La museto ekridetis al ĉiuj flankoj,

AL PANJO

de Leda Mileva

Ĉar vi per kantoj lulis min,
tagnokte gardis min sen fin'
kaj min instruis pri laboro,
vekigi en la frua horo
kaj sur la patrolanda tero
fidele zorgi pri l' libero —
mi diros al vi tion solan:
amata panjo, dankon koran!

Tradukis Asen Grigorov

klinsalutis. Unu rato surkapigis al li la kronon kaj laŭte tralegis la surskribon:

— „Al la venkinto de la katoj kaj nia savinto“!

— Mi ne ekflaras katon! — aŭdiĝis la voĉo de l' maljuna najbarino.

Tiam ankaŭ aliaj buŝetoj streĉis sin, ektermis lipharetoj.

— Vere, ankaŭ ni ne ekflaras!

— Ankaŭ ni! . . . — aŭdiĝis de diversaj flankoj.

— Vi mem konvinkigos — diris la museto kaj severe ordonis al la kato: — Miaŭu!

Ĝi silentis.

— Miaŭu!

La museto koleriĝis kaj frapis ĝin per ambaŭ piedoj.

„Ĝan!“ — ektintis la vitra kato kaj transformiĝis en pecetojn.

La publiko mirkriis kaj proksimiĝis por vidi la pecetojn de proksime.

La museto-fanfaronulo profitis tiun momenton kaj malaperis.

— Kien li kaŝis sin! — oni ĝin ekserĉis post nelonge.

— Lasu! — trankviligis saĝe ilin la maljuna najbarino. — Li tute ne estas necesa al vi. Saĝo, forto kaj kuraĝo ne estas ornamaĵoj por novjara arbo. Ili estas io pli longedaŭra.

Tradukis K. V.

UZZA KOLEKTO DE 1600 KRAJONOJ

Huegara gimnazia profesoro havas interesan „hobion“, pri kio jam kelkaj hungaraj kaj eksterlandaj gazetoj raportis: li kolektas diversspecajn kraĵojn el la tuta mondo kaj jam atingis muzean kolekton de 1600 specoj. Inter ili estas jam 10 esperantaj kraĵoj. Li korespondas kun multaj landoj kaj ofte ricevas donaco, sed li volonte sendas ion reciproke, se li ricevas ian fabrikaĵon — neuzitan eszempleton, — kiun li ankoraŭ ne havas. Precipe estus bone ricevi kraĵojn kun tekstoj pri kaj en Esperanto. Li havas tiajn nur svedajn, hungarajn kaj kelkajn bulgarajn kaj ĉeĥoslovakajn. Espereble, estos esperantistoj, kiuj havigos al li el sia lando po unu el tiaj fabrikaĵoj. Sendu rekte aŭ faru proponon. Li povus sendi almenaŭ belan Esperanto-prospekton el Hungario. Lia adreso: prof. József Füjöp, Csur u 6, Szécheny tér 9, Hungario.



KOLOMBO KAJ PAVO

de Venelin Mitev

Sidiĝis sur tegmenton iufoje
Kolombo blanka kaj ekkveris ĝoje.
Malsupre, en la korto,
kun memfida gravo
promenis

Pavo.

— He,
deziras mi demandi vln pri io —
ĉesigis
ia kolomban kanton

krio.

— Jam multajn jarojn mi senĉese
penas,

sed ankaŭ nun sekreton vian
mi tute ne komprenas.

Estimas vin la homo,
eĉ prikantas vian —

ho, dio gardu! — belon harmonian.

Kaj pentras li sur ĉiu libro

kaj afiŝo,

kaj insigno

flguron vian.

Vidu, li parolas, estas ĝi simbolo

de niaj revoj,

nia pachatala volo!

Prave, kun indigno,

hierau

tie ĉi

la Meleagro —

de sia alta rango —

diris:

— Ni

ne plu devas

tiel pacience stari!

Ni ĉiuj devas

tuj

proteston fari

antaŭ

la reĝo de la animaloj!

Mi

ankaŭ vin demandas:

kie estas,

kie,

ĉi tiu

elpensita de la homo,

belo via?

Nenie!

Ĉu ja ne estas mi pli inda

por posteno tia?

Respondis la Kolombo:

— Kara mia,

sciu bone:

ai mi

ne p aĉas la beleco

servanta kiel

kaŝilo de l' stulteco!

VORTLUDOJ

Ĉu vi povas respondi al tiuj ruzaj
demandoj?

1. Kiu **ano** ne estas homo?

2. Kiun **benon** bezonas ĉiu kudristo?

3. Kiu **falko** neniam flugas?

4. Kiun **urson** oni trovas ankaŭ en
urboj?

5. Kiu **rizo** timigas la homojn?

Por helpi vin, ni respondas al la unua
demando: ban-ano = banano.

REDAKCIA POŬTO

G. Ĉ. — v. *Borislav*: La versaĵo ne
taŭgas. Mankas poezia stilo, bildeco,
emocieco. Mankas ritmo kaj rimoj,
estas gramatikaj eraroj. Por verki bo-
nan versaĵon oni devas, unue, posedi
bone la lingvon kaj, due, regi la re-
gulojn de la poezia verkado. Estas frue
publikigi viajn versaĵojn. Laboru! Ni
bondeziras sukcesojn.

K. — *Ruse*: Estas tro temporaba
kaj turmenta afero eltiri bonan ercon
el tavoloj de vortbalasto. Ĉu vi ne
povus verki pli koncize kaj skribi klare
aŭ maŝine?

Iv. F. — *Kjustendil*, V. G. — *Pleven*,
J. K. — *Ruse*: La materialojn ni uti-
ligas. Sed ni petas: sendu ĉion Espe-
rantlingve! La redaktoro devas redakti
kaj ne — traduki, ĉu ne? Kial mankas
fotoj?

Ivo At. — *Kjustendil*: Legu atente
en la „Redacia poŝto“ de „BE“
№ 11/1968. Ni atendas de vi materia-
lojn.

Bulgario

Stefan Veltov, Kazanlâk, str. D. Blagoev 20 — interŝanĝas numizmatikaĵojn kaj monerojn.

Studentoj-esperantistoj dez. kor. kun ĉl. Komuna adreso: Dima Iv. Dimov, Instituto por instruistoj-specialistoj, Gabrovo.

Gelernantoj-esperantistoj (16-17 j.) dez. kor. kun ĉl. Adreso: Maria Cenova, instruistino, v. Trâstenik, Plevensko.

La lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato serĉas korespondantojn por siaj gestudentoj — tutmonde, pri ĉt. Konstanta adreso: Kunĉo Vâlev, str. Ĉatalĝa 5, Sofio 27.

Hungario

28-jara geedza paro serĉas amikojn por turisma helpo (gvidado) dum venontjara aŭtovojaĝo en socialismaj landoj: Zonai Jo zsef, Allomás u. 2, I, Kiskunhalas.

Béla Löffler, Pharmacological laboratory Budapest IV, Tó u. 1-5 — kun ĉl.

Nov-Zelando

Ted Dawson, 47 Aparima ave, Miramak, Wellington — dez. kor. kun bulgaroj.

Pollando

Ŝanĝita adreso: Jerzy Uspenski, Varsovio 12, str. Bronowoja 6, m. 30.

USSR

Saulius Šivickas, Komjaunimo 33, Pasvalys, Litovio TSR — dez. kor. kun ĉl. int. PM (en plenaj serioj)

Ŝ. Jansanĵav (25-jara), korpus 5 „D“, urbo Penza 5 — dez. kor. kun ĉl, interŝanĝas BK, artfotaĵojn.

Moskvaj studentoj-esperantistoj deziras kontakti kun bulgaraj studentoj kaj interŝanĝi E-materialojn kaj leterojn. Ili ĝojus renkonti en Moskvo bulgarajn studentojn, kiuj venas ekskurse, aŭ aliajn bulgarajn esperantistojn. Adresoj: Moskva B-234, (MGU) korpus „J“, kom. 431, Genov Geno Tanov, kaj Moskva B-234, (MGU), korpus „B“, kom. 1857, Arloviĉ Viktor.

REGUSTIGO

En „Nia respondo konekse kun la Oficiala Komunikajo de la Akademio“ („Bulg. Esperantisto“ № 7/8, 1968) estas enlastita, pro eraro, neĝusta aserto, ke la gazeto „Norvega Esperantisto“ ne donis lokon en siaj paĝoj al la „Oficiala Komunikajo“. Ni povis konstati, „dank“ al atentigo de s-ano C. Stöp — Bowitz, ke en la 1-a numero de „Norvega

Esperantisto“ (1968) la dirita Komunikajo estas publikigita. La Redakcio de nia gazeto bedaŭras pro la enlasita neĝustaĵo.

GRANDA ESPERANTO-KONKURSO KUN PREMIOJ

Okaze de la jubileo — X-jaro de la redakcio de la disaŭdigoj en Esperanto de la Pola Radio, kiu pasos la 4 de aprilo 1969 — ni anoncas Grandan Konkurson kun premioj.

La ĉefa premio estas alveno al Pollando por 12-taga estado. La vojaĝo ambaŭflanken kaj la estado, kompreneble, senpagaj.

JEN LA DEMANDOJ DE NIA KONKURSO: 1. En la jaro 1887 estis eldonita la unua lernolibro de la Internacia Lingvo Esperanto.

Menciu la nomon de la urbo, kie ĝi aperis. 1. En Esperanto-traduko oni eldonis plurajn elstarajn verkojn de la pola literaturo.

Menciu unu el ili.

2. En la jaro 1959 okazis en Varsovio la 44 Universala Kongreso de Esperanto.

Menciu la nomon de ĝia Honora Protektinto kaj la nomon de la tiama prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, kiu prezidis la solenan inaŭguron.

LA PARTOPRENANTOJ EN LA KONKURSO, KIUJ TRAFE RESPONDOS AL DU EL INTFR LA TRI DEMAMDOJ, PARTOPRENOS LOTADON DE PREMIOJ, kiel: senpaga alveno al Pollando por 12-taga estado, radioricevilo, fotoaparato, elfaraĵoj de la pola popola arto, libroj, albumoj, diskoj kun verkoj de la pola muziko k. a.

La respondojn oni devas sendi al la adreso: Pola Radio, Varsovio, Pollando — kun la kromnoto: „Konkurso de la X-jaro“.

LA TEMPLIMO DE LA ALSENDADO: 31 de januaro 1969 (decidas la dato de la poŝta stampo). La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en ĉiuj tri disaŭdigoj de la „Pola Radio“ en Esperanto la 15 II. 1969

LA GAJNINTO DE LA ĈEFPREMIO PARTOPRENOS LA SOLENAĴON DE LA JUBILEO DE LA ESPERANTO-REDAKCIO.

LETERVESPERO KAJ EKSPOZICIO

Fervojista Esperanto-Klubo, p. k. 1, Ruse, Bulgario, aranĝos letervesperon kaj ekspozicion dum februaro 1969 sub la signo de la teknika progreso en la fervojoj. La XX-a Jubilea IFEF-Kongreso fariĝis vera manifestiĝo de la taŭgeco de Esperanto, de la utileco de nia Movado. Ni intencas denove konfirmi tion per: leteroj, p. k., b. k., afiŝoj, revuoj, insignoj, gazetoj, ĵurnaloj, artikoloj pri fervojnovaĵoj en Esperanto k. s.

Ni petas — helpu nin! Respondon ni certigas kaj laŭdezire daŭrigos korespondadon.